Marie Hankel,

Vana espero

Somero alvenis,
Per floroj nin benis,
Varmega la tero
Kaj viva l'espero!
Nun ridas la suno
Al ni de l'aŭtuno –
Ser ĉiel nur ploroj,
malgajaj la koroj!
Ho, kial vi plendas?
Ni fruktojn atendas,
Sed nuda la tero –
Kaj vana l'espero!
Tamen!
Laboro senlaca,
Persista kaj paca,
Kvazaŭ nur prove
Penadas denove
Kun timo kaj tremo,
Per diligentemo.
Proksiman la jaron
Ni trovos fruktaron.

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Marie Hankel *(nask. Dippe, ∗1844-02-02 – †1929-12-15).*

Arg-815-1635 (2013-02-03 14:22:25)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poemon en la kongres-libro (sur paĝo 35) de la 55a.IFEF-kongreso, kiu okazis en Dresdeno, de la 10a ĝis la 16a de Majo 2003.